

★ Kioto-Esperanto-Societo Kioto-Esperanto-Societo Kioto-Esperanto-Societo ★

Al Vi Kara

★ Kioto-Esperanto-Societo Kioto-Esperanto-Societo Kioto-Esperanto-Societo ★

N-ro 107, aŭgusto 2022



FARBITOJ (アサガオ)

Dum la someraj ferioj de elementa lernejo, observi la kreskadon de farbitoj estis, estas, estos interese.

SUITO Acuko

☆ ENHAVO (目次) ☆

FARBITOJ (アサガオ)	水渡 篤子	表紙
Esperanto por mi について	野田 淳子	p.1
<i>Esperanto por Ni</i> : Esperanta libro, en kiu amo pleniĝas	富田 成美	p.2
Vizito al Gunkanjima	六郷 恵哲	p.4
子供と言葉	六郷 恵哲	p.6
50-jariĝo de la reveno de Okinavo	山内 利朗	p.7
Ĉu elektromagneta ondo el poŝtelefono estas danĝera?	森川 和徳	p.10
Saluton al ĉiuj	両角 美幸	p.13
Venas la Vintro, Ne Foras do l' Printemp' 冬来たりなば春遠からじ	西田 千津	p.14
Floroj kaj malnova vendejo	吉井 滋子	p.16
エスペラント語の絵本	西本 祐子	p.18
八木幹子さんの思い出	相川 節子	p.19
Nun necesas la naŭa artikolo de la japana konstitucio	相川 節子	p.20
Danke ricevitaĵoj		p.20
Cent Ŝtupoj de Ŝtuparo	松村 伸一郎	p.21
京都での例会		p.22
La malnova KLEG-oficejo	松田洋子	裏表紙 の裏
FM79.7 京都三条ラジオカフェ 「エスペラントって何？」		裏表紙

Esperanto por mi について

野田 淳子（正会員、京都市東山区）

群馬エスペラント会の名物エスペランティストの堀泰雄さんは、いくつかの出版物も扱っておられます。その中の「Esperanto por mi」は、ドイツのヘルガ・プロエトネルさんという女流画家が1冊に16人の世界のエスペランティストを選んで、その肖像画とその方のプロフィール（自身による紹介）と写真をつけて出版されています。1～4集まで製作され、1～3集までほとんど売り切れ、今、9月23～25日の八王子での日本大会までに第5集を出版予定されています。

ヘルガさんからの日本の歌手を紹介してほしいとの要望で、堀さんが私を推薦してくださり、この幸運なチャンスを受けました。ヘルガさんは何度も私の顔を描き直してくださり、紹介文は堀さんのアドバイスで、ページが出来上がりました。本当にうれしく光栄です。今闘病中のヘルガさんの作品第5集を是非手に取って、読んでいただけましたら、こんなに嬉しいことはありません。



ヘルガさんによる
野田淳子の肖像画

< Esperanto por mi の紹介文 >

Mi naskiĝis en la urbo Sasebo en la gubernio Nagasaki. Kiam mi estis juna, mi laboris en Tokio. Tiam usonaj kantoj nomataj “folksongs” estis tre popularaj en la mondo. El multaj kantistoj al mi plej plaĉis usona kantistino Joan Baez. Ŝiaj mieno, voĉo, ideo kaj deziro por paco tiel sorĉis min, ke ankaŭ mi komencis kanti kaj ludi gitaron. Laborante en la kompanio, mi kantis en diversaj koncertoj, kaj mi fariĝis profesia kantisto. Ĝis nun mi kantis en pli ol 3000 koncertoj kaj eldonis 8 kompaktnajn diskojn kaj komponis por du filmoj.

Mi sciis pri Esperanto antaŭ 30 jaroj, kiam mi legis la libron “Juneco en rezistado”. Ĝi temis pri junulo, kiu estis arestita pro lernado de Esperanto kaj mortigita dum la dua mondmilito. Mi komponis kanton “Trans la tempofluro” pri li, kaj sciinte tion, oni invitis min al Esperanto-Kongreso okazinta en Kioto.

Antaŭ 10 jaroj mi komencis lerni Esperanton. Unu el miaj amikoj, kiu aŭskultis tiun kanton, rekomendis, ke mi lernu Esperanton. Nun mi apartenas al Kioto-Esperanto-Societo kaj ĝue lernas ĝin. Post mia esperantistiĝo, oni donis al mi okazajn kanti en diversaj Esperanto-Kongresoj, ekzemple en Komuna Kongreso inter Japanio kaj Koreio okazinta en la urbo Nara en 2018. Esperanto donis al mi pli da okazoj kanti en pli da internacia etoso.

Danke al Esperanto mi havis okazon kanti en la 70a Kansaja Esperanto-Kongreso en junio kaj eldonis albumon konsistantan el esperantaj kantoj, kaj kantis en la 109a Japana Esperanto-Kongreso en septembro en 2022.

Esperanto donas al mi grandan ĝojon, kaj mi estas tre ĝoja, ke mi povas kontribui al Esperanto-movado per miaj kantoj.

Esperanto por Ni : Esperanta libro, en kiu amo pleniĝas

TOMIDA Narumi (Kioto)

Mi parolis tiun rakonton en nia radioprogramero “Kio estas ja Esperanto?” en la 13a de julio, 2022.

Seriaĵo de esperantaj libroj, nomiĝas ”Esperanto por Ni”, estas redaktita kaj eldonita de veterana esperantisto s-ro Hori Jasuo, kiu loĝas en la gubernio Gunma. La unua libro estis eldonita en 2020, kaj nun la kvina estas redaktata. En ĉiu libro, po 16 personoj, entute 80 esperantistoj, kiuj estas kolektitaj el la mondo, esprimas siajn rilatojn kun Esperanto kiel mallonga eseo. Fakte, en la kvina, nia amikino s-ino NODA Ĵunko aperos! Pri ŝia pasio por esperanta kantado, kiun ŝi skribis en sia eseo, komisionte ŝin paroli ĝin aliokaze, mi prezentos karakteron de la serio ĉi tie.

En ĉiu eseo, kun sia foto, estas ankaŭ aperigita la portreto de la esperantisto, kiu skribis la eseon. Mi kredas, ke tio estas granda unikeco pri ĉi tiu serio. Tiuj ĉiuj 80 portretoj estas pentritaj de unu esperantisto de portreta pentristo. Estas s-ino Helga Proetnel en Germanio. Ŝi posedas mirindan genion pri pentrado, kaj multfoje havis personajn ekspoziciojn pri portretoj en la UK kaj aliaj esperantaj kongresoj en Germanio. Antaŭ ĉio, ŝi estas mia “esperanta patrino”! Estas granda ĝojo mia voki ŝin tiel.

Ĉi-foje, mi sendis al Helga miajn kelkajn demandojn pri ŝia penso kiel la pentristo de la portretoj por “Esperanto por Ni”, ĉar nia amikino Ĵunko fariĝis unu el la eseo-skribintoj.

****La unua demando:** Kio estas valoro por Helga en la pentrado de la portretoj? Ŝi diris; tio estas ŝia pura ĝojo koni la homojn, kiujn ŝi pentras. Por sia laboro, ŝi devas kontakti ilin kaj havi komunikadon kun ili multe per interreto tage kaj nokte. Laŭ tia klopodo reciproka, ŝi amikiĝis kun ili. Tiu ĝojo estas.

****La dua demando:** Kion Helga penis dum la pentrada laboro? Ŝi diris; tio estas ŝia preĝo, nome pentrado kun preĝo. Portretado kun kredo, amo kaj espero por paco estas ŝia granda propreco kiel pia kristano.

****La tria demando:** Kion Helga volas esprimi pri ĉiu esperantisto? Ŝi diris; tio estas ĉiu el valoraj spiritoj, kiuj vivas reflekte en siaj mienoj kaj pupiloj. Kaj ankaŭ interese por ŝi, ke legantoj de la serio rekte povas scii laŭ la libroj la esperantistojn, kiuj faras ĉiun grandan Esperanto-movadon en la mondo kaj agas vigle por ĝi.

Aldoninte al tiuj respondoj, Helga sciigis min tre detale pri sia stato dum la laboro por unu portreto. De la unuafoja desegno ĝis la kompletigo, ĝi bezonas ege multe da tempo en ŝi. Litere, forgesante dormadon kaj manĝadon kaj trinkadon, ŝi igas sian tutan forton koncentrigi al la laboro. Post ŝi finis fari la unuan kompletigaĵon, plue ŝi aldonas modifadon al ĝia hararo, lumo kaj ombro. Tia laboro estas daŭrigita ĝis ŝi kaptas la spiriton, kiu apartenas al iu, kiun ŝi pentras surbaze de la foto. Post la verko perfektiga, Helga sendas ĝin al s-ro Hori kaj la modelo petante iliajn taksojn. En iu okazo, ŝi repentras. La laboro devigas al ŝi sinkoncentradon kaj streĉitecon. Do, ŝi diras al si mem, “Helga, tasko kreskigas la homon!”

Nun Helga havas 77 jarojn. Pro malfacila malsano, kiu donas teruran doloron en ŝiajn tutkorpajn muskolojn, ŝi vivas sur fleglito kaj elektra rulseĝo. Kio kondukas ŝin al pentrado de portretoj? Ĝi estas ŝia amo al homoj, la homoj, kiujn ŝi pentris, kaj Esperanto, kaj espero al paco. Legontoj de la serio profundigos sian intereson pri Esperanto, kaj ili estos ligitaj kun la eseo-skribintoj per Esperanto : Tio estas ŝia aspiro.

Esperanto estas la lingvo, kiu ligas homojn kaj naskas pacon en homaj koroj. Mi elkore deziras, ke nia lingvo fariĝu “ilo”, kiu portas pacon al nia realo, en kiu pleniĝas konfliktoj kaj perforto.

(Aldono) Vidante la mondon, homoj, kiuj parolas la samajn lingvojn, malamas kaj militas per iliaj samaj lingvoj. Aliflanke, iuj homoj uzas lingvojn kiel “ilojn” por regi aliajn. Ili rabas lingvojn de iliaj regatoj kaj devigas sian lingvon al ili. Tre Bedaŭras!! Uzado de la sama lingvo NE ĉiam kreas pacon. Nur reciproka uzado de la sama lingvo kun amo, kredo kaj respekto “naskas” pacon. Mi kredas tiel (do ŝajnas, ke Dio ruinigis la turon de Babelo). Origine, nia lingvo Esperanto naskiĝis por ke, homoj eliros de malpaco kaj malegalo, kaj akiros repaciĝon kun iliaj “malamikoj”, dividataj de la lingvoj. Do, tiel longe kiel ni uzas tiun lingvon kun amo, kredo kaj respekto al niaj proksimaj kaj malproksimaj, Esperanto devas esti en la plej proksima situo al paco, kiun ni homoj povas fari per lingvoj. Mi forte konvinkiĝas tiel. (Fino)



Narumi kaj Helga

Vizito al Gunkanĵima

ROKUGO Keitetsu (Gihu)

En aprilo 2022, mi partoprenis en esplorprojekto pri ŝtalbetonaj (aŭ ferbetonaj) strukturoj konstruitaj sur la insulo Haŝima en la teritorio de la urbo Nagasaki. Tiu ĉi insulo nomiĝas Gunkanĵima, ĉar la formo similas al batalŝipo (en la japana, Gunkan). Ĉi tiu artikolo donas la skizon de la insulo, la celon de la esplorprojekto, kaj mian agadon tie.


Gunkanĵima

Karbminado komenciĝis sur la insulo en 1890 kaj finiĝis en januaro 1974 laŭ la vikipedio pri ĉi tiu insulo. Ĝi iĝis senloĝanta en aprilo. La loĝantaro de la insulo superis 5,000 en 1960. La insulo estis pligrandigita plurajn fojojn. La nuna areo estas ĉirkaŭ 6.3 hektaroj (63,000m²). La insulo estas ĉirkaŭita de betona marmurego. Estas sanktejo sur la pinto de la insulo. Ekzistas loĝejoj sur la nordokcidenta flanko de la insulo, kaj karbominejaj instalaĵoj sur la sudorienta flanko.

Per “Google Earth”, ni povas vidi la insulon el diversaj anguloj (Foto 1). Ni povas viziti internojn de la insulo uzante “Google Street View” (Foto 2). Se la ondoj estas trankvilaj, turistoj sur ekskursŝipoj povas alteriĝi sur la insulon kaj viziti sekurajn lokojn.



Foto 1 La insulo Haŝima (Gunkanĵima) sur “Google Earth”.



<https://www.google.co.jp/maps/@32.6282794,129.7382702,2a,75y,50.53h,90.35t/data=!3m6!1e1!3m4!1s4c8FKpuQiOMAAQh48liQ!2e0!7i13312!8i6656?hl=ja>

Foto 2 Internoj de la insulo tra “Google Street View”.

La esplorprojekto pri Gunkanjima

Antaŭ pli ol 100 jaroj, en 1916, sur la insulo estis konstruita la unua ŝtalbetona altkonstruaĵo (Konstruaĵo n-ro 30) en Japanio. De tiam ĝis 1964 tie estis konstruitaj pli ol 70 ŝtalbetonaj konstruaĵoj. Pro la severa sala medio, la korodo de la ŝtalaj stangoj en betono estas tre progresinta, kaj kelkaj partoj de la ŝtalbetonaj konstruaĵoj komencis kolapsi.

En julio 2015, la karbminejo de la insulo estis aprobita kiel Monda Heredaĵo de Unesko. La esplora agado komencis serĉi manierojn konservi grave degraditajn ŝtalbetonajn konstruaĵojn. La projekto celas klarigi riparmetodon, kiu povas ĝuste ripari difektitajn ŝtalbetonajn konstruaĵojn konservante la senton de ruinoj kaj konservi ilin dum longa tempo. Krome, la projekto celas observi kaj registri la procezon de kolapso de ŝtalbetonaj konstruaĵoj pro difekto. Konstruaĵoj estas kutime riparitaj aŭ malkonstruitaj antaŭ ol ili iĝas danĝeraj. Tial, la kolapsa procezo tre malofte povas esti observita.

Al la urbestro de Nagasaki, ĉiuj membroj de ĉifoja esploro prezentis promeson ke ili respondecos pri ajnaj akcidentoj kaj ne postulos kompenson.

Mia agado kun multkoptero (aŭ senpilota aerveturilo, aŭ “drone”)

Mi kunportis multkopteron (DJI Mavic 2) kun fotilo. Preskaŭ ne estis vento en la tago. Ĝi taŭgis por flugo de multkoptero. Foto 3 montras la tegmenton kaj ĉambro de la Konstruaĵo n-ro 70, lernejo konstruita en 1958. Ĉi tiuj fotoj estas partoj de la videobildoj prenitaj de la fotilo sur la multkoptero. La ŝtalstrukturo sur la tegmento de la konstruaĵo kolapsis. En la ĉambro la ŝtalaj stangoj de la ŝtalbetonaj traboj korodiĝis kaj ŝvelis, kaj la kovra betono ĉirkaŭ la stangoj disfalis. Uzante la fotilon de la multkoptero, mi povis sekure preni fotojn kaj videobildojn de ajna angulo.

Mi alfiksis fiŝsnuron de fiŝkano al ĉi tiu multkoptero por eviti ke ĝi forflugu kaj malaperu. Fiksa pezo kaj movebla pezo estis ligitaj al la fiŝsnuro por malhelpi ĝin kaptiĝi en la multkoptero. La fiksa pezo estis fiksita je ĉirkaŭ 1 metro de la multkoptero. Ĉi tiu fiŝsnuro estas utila por tiuj, kiuj ne bone konas flugadon de multkoptero. (Fino)



Foto 3 Tegmento kaj ĉambro de la Konstruaĵo n-ro 70.

子供と言葉

六郷 恵哲（正会員、岐阜市）

＜喋り始め＞ 孫娘が、2歳になる数か月前、内容のある言葉を喋り始めた。「おかあ...」、「ねこ」＋「たくさん」と、1語、2語、3語、... と、単語の種類と組合せが急速に増え、喋る内容が豊かになっていくのをたいへん興味深く眺めていた。自分の子供（娘2人）の喋り始めについては、残念ながら記憶にない。

＜読み始め＞ 孫は、小さいころからたくさん絵本を読んでもらっていた。その甲斐があったのか、比較的早くから好きな絵本や漫画本を自分一人で読むようになった。2020年秋（6歳半）、鬼滅の刃（全23巻）の漫画本を必死に読んでいた。漢字に仮名が振ってあるので読みやすい。全巻を、孫は2回読んだと言っていた。私は、何とか1回読んだ。

私の子供の頃を思い出した。小学校に入学する前の12月（6歳半）、幼稚園のクリスマス会の舞台上、椅子に座って新聞を読みながら居眠りする役を演じた。見ていた保護者達がクスクス笑うので恥ずかしかったと、帰宅して母が言った。当時、私はまだ文字を読めず、新聞の上下が逆さまだった。

＜理解始め＞ 聞いたり読んだりしたことを、そのままスナリ理解する「理解始め」については、本人しか分からない。私の場合、エスペラントを学んでしばらくしたところに「理解始め」を経験し、会話中心の易しいエスペラントに魅せられた。それまでの外国語学習では読解が中心で、理解することとは内容を日本語で表現できることだと思っていた。

＜英語＞ 4月に小学校2年生になった孫との会話の中に、英単語が混ざっていた。尋ねてみると、1年生からの英語の学習では、教科書は無く、簡単な単語やフレーズを使って楽しんでいるようだ。耳と口で練習しているので発音が自然だ。学習には、動機付けも大切だ。例えば、ボランティアの助けを借り、英語を学習中の海外の小学校の教室とオンラインで繋ぎ、英語で発表会やお喋り会を開くなどすれば、英語学習の楽しさと有用性を体感できる。

翻訳ツール（Google 翻訳、DeepL 翻訳、等）や通訳機の進歩が目覚ましい。誤訳を少なくするため、主語・述語・目的語が明確で修飾が少ない短い文や、アナウンサーのような明瞭な話し方が一層好まれるようになるであろう。理解できない外国語への翻訳にこれらのツールを使う場合に、希望すれば、理解できる補助言語（例えば、エスペラントや英語）でも同時に表示されると、翻訳内容を確認でき、便利と思う。

＜フランス語＞ 1986年3月から1年間、私は家族を伴って、スイス西部のフランス語圏にあるローザンヌ工科大学に出張した。ローザンヌでは、小学校は9月に始まる。6歳になった長女は、9月から2月までの半年間、小学校に通った。帰国する頃には、長女は簡単なフランス語を話せるようになっていた。旅行や買い物などで、フランス語が必要な時に時々助けてもらった。しかし、長女は、帰国して友達と3日も過ごす、使わないフランス語への興味を失い、そのまま忘れた。大学生になって、第2外国語としてフランス語を選択したが、発音の仕方も含め何も残っていなかったと言っていた。

（終）

50-jariĝo de la reveno de Okinavo

YAMAUCHI-Toshirou (Kioto)

Ĉi jaro 2022 estas 50-jariĝo de la reveno de Okinavo al Japanio. Mi volis pli scii pri Okinavo kaj legis kelkajn dokumentojn. Mi prezentu tion.

<La propono pri la revenigo de Okinavo>

Unue mi opinias, ke oni devas legi la dokumenton, "LA PROONO PRI LA REVENIGO" (「復帰措置に関する建議書」). En ĝi oni skribas esperojn kaj postulojn de okinava popolo sub la militista regado de Usono jene.

Ni, la RYUKYU-registaro pristudis pri la tutaĵo de la revenigo de Okinavo, kiun promocias la japana registaro, kaj proponas jene. Ni forte postulas, ke ĉiujn proponojn realigu.

La 18a de Novembro, 1971

YARA-Chobyu, la administra estro de la RYUKYU-Registaro

Antaŭskribo

... en paca insularo Okinavo antaŭ milito, vivo de okinavanoj estis ĉiam politike kaj ekonomie en nebenata, malavantaĝa kaj malfeliĉa situacio, ĉar Okinavo situas tre malproksime de la centro de la lando, kaj pro diskriminacia antaŭjuĝo pri okinavanoj ... Kaj krome la milito altrudis al ni kruelan viktimon, perdon de kelk-cent mil da karaj vivoj, ekstremaĝon de valoraj kulturaj heredaĵoj kaj sekvajn dudekses-jaran doloregan vivon sub la rego de Usona Armeo. Ni rememoras longan malfacilegan vojon.

... Usono en Okinavo konstruadas grandegajn militajn bazojn sub pravigebla nomo de "Defendo de liberalaj landoj en Ekstrema Oriento". Do, nia reala sento estas, ke Okinavo estas ene de militbazo. Miliono da okinavanoj vivadas sur malgranda insulo ĉirkaŭate de militbazo, de nukleaj armiloj kaj gasaj armiloj. Niaj politikaj rajtoj estas ege limigitaj, eĉ niaj bazaj homrajtoj estas minacataj. Tion atestas sennombraj ekzemploj. ... Diversajn damaĝojn kaj difektojn pro militbazoj, multajn nerevokeblajn tragediojn okinavanoj ricevadas. Ni okinavanoj soife deziras revenon kiel sen-militbaza paca insulo...

1. Fundamentaj Postuloj

... Okinavanoj travivis multajn malfacilojn kaj doloregojn, kaj la figuro de nia reveno, kiun okinavanoj decidis, estas "tuja, senkondiĉa kaj tute ĝenerala reveno". Per tio okinavanoj komplete povas repreni rajtojn kiel de japana popolo sub la paca japana konstitucio. Kaj ni okinavanoj, kiuj ĝis nun senĉese estis oferite utiligitaj por milito kaj spertis teruran Okinava-batalon, ĉiutage firme decidis, ke ni neniam devas estigi nin en la sama milita situacio.

Tiel okinavanoj elkore soifis sen-militbazan vivon. Kaj tamen, en la novembro, 1971, la japana ĉambro de deputitoj perforte aprobis "la Konvencion inter Japanio kaj Usono pri la reveno de Okinavo". La konvencio akceptigas al Okinavo ke Usona armeo uzadas la militbazojn, kiujn usona armeo perforte forrabis kaj plivastigis per "paf-armiloj kaj buldozoj" de okinava popolo. Tiam s-ro Yara alskribis al sia taglibro, "Espero de Okinavanoj estis tretita kiel foruzita ŝuaĵo".

Kaj nun, ankoraŭ nun, multaj militbazoj estas altrudataj al Okinavo. Kaj krome la belega kara naturplena golfo HENOKO estas oferata. La espero soifa por paco ankoraŭ ne estas realigita.

<Infanoj, kiuj travivis tra Okinava Batalo>



Ĉu vi iam vidis la foton? Oni povas vidi kaj citi la foton sur interreto, je la Okinava Gubernia Arkivo. (沖繩公文書館所蔵)

La klarigo de la foto estas jene: La knabino kiu atendas kuracadon de siaj vundoj.

Mi trovis la foton sur dorso de la kovrilo de libro nomata "Infanoj, kiuj travivis tra la Okinava batalo" (de OOTA-Masahide 大田昌秀『沖縄戦を生きた子どもたち』クリエイティブ、2007年).

En la foto estas unu nudpieda knabino kun "okappa" hararo, ŝi ĵetas malviglan rigardon kaj ŝia ŝirita vesto estas makulita de sango. Ŝia dekstra brako

estas pendata. Supozeblas, ke certe ŝi travivis tra la "fera uragano".

Sed mirinde ĉi tiu infano estas ne knabino, sed knabo. La historio estas jene.

Li nomiĝas OOSHIRO-Moritoshi (aŭ Seishun 大城盛俊) . Tiam, kiam knabo Moritoshi estis 12 jarojn aĝa, japana armeo preparis militon kontraŭ Usono en lia vilaĝo. Kaj eĉ lernantoj de baza lernejo devis helpi la soldatojn konstrui milit-pozicion. Lia patro diris al li, "mi timas, kion japanaj soldatoj ordonas / faras al vi en milito. Ĉar vi estas viro. Do, vi longigu vian hararon, kaj ŝajnigu vin virina." La knabo Moritoshi komence hezitis, ĉar liaj amikoj mokos kaj turmentos lin, kaj unue li ne povos iri ekster domo pro honteco. Sed la patro, kiu estas kutime milda, ordonis al li severe ol iam. Do li longigis hararon kaj iĝis knabina figuro kun "okappa" hararo. Usona armeo surlandiĝis (la 1an de Aprilo, 1945) kaj la milita situacio iĝis tre severa kaj malbona. Fine la knab(in)o Moritoshi kaj lia familio fuĝis en naturan kavernan ŝirmejon. La 3an de Junio ses japanaj soldatoj envenis en kavernon kaj postulas nutraĵon. Knabino Ooshiro responde diris, "ne havas". Unu soldato provis forpreni dorsosakon de Ooshiro, do la knabino alkroĉiĝis al la sako dirante, "ĉi tio estas nia nutraĵo". Kaj alia soldato diris, "Impertinente! Ĉu vi kontraŭas armeon?", kaj eltiris la knabinon ekster la kavernon kaj pugne kaj piede batadis. La knabino baldaŭ svenis. Tiam knabino Ooshiro revekiĝis, ŝi estas en la brakoj de lia patro. Al knabino ne perfortas eĉ kruela soldato, la patro pensis kaj igis knabon okappa-knabino. Sed la espero ne iris tiel.

La dekstra ŝultro de knabino Ooshiro elartikiĝis, do lia patrino pendis la brakon. Kaj lia facio kaj piedo havis kontuzon, per dekstra okulo batita li ne povas vidi, dorso de kapo havis ŝirvundon pro tretado de soldata ŝuo. Kaj poste knabino Ooshiro kaj lia familio estis kaptitaj de usona armeo kaj estis fotita.

Poste, vivo de junulo Ooshiro ne estis facila. Lia vera patrino (li estis adoptita filo) estis murdita de japana soldato kiel spiono de Usono. Li vivis en Oosaka kaj post dudek kaj kelkaj jaroj revenis al Okinavo. Sed ostoj de milit-mortintoj ankoraŭ estis lasitaj, kaj ankaŭ neeksploditaj bomboj estis troveblaj tie kaj ĉi tie. Kaj militbazoj, "la fontoj de malbonoj", ne malmultiĝis, sed estis fortigitaj kaj vastigitaj. Tio tute ĉagrenis lin.

Nuntempe iuj asertas revizii la japanan konstitucion. Sed mi leginte tiujn dokumentojn certigis min, ke ni devas konservi kaj realigi nunan konstitucion.


(Fino)

Ĉu elektromagneta ondo el poŝtelefono estas danĝera?

MORIKAWA Kazunori (Oojamazaki)

1. Disvastiĝo de poŝtelefonoj

Nun preskaŭ ĉiuj havas poŝtelefonojn kaj saĝtelefonojn. Ili fariĝis absolute necesaj komunikiloj por nia ĉiutaga vivo, dum strattelefonoj troviĝas nur en la limigitaj lokoj: stacidomoj kaj hospitaloj. 0.2 % de la japana loĝantaro uzis poŝtelefonojn en 1989, sed averaĝe 154 % uzas ilin en 2021. Ĉar la japana loĝantaro inkluzivas bebojn kaj infanojn, do “154 %” signifas, ke multaj havas du telefonojn.



Poŝtelefono



Strattelefono




Saĝtelefono

携帯電話の訳語は poŝtelefono (ポケット電話) で確定していますが、スマートフォンの訳語が確定していません。最もよく使用されているため、本稿では saĝtelefono (賢い電話) を使用しています。スマートフォンが本当に賢いのか疑問があります。他の訳語としては inteligenta telefono, lerta telefono, smartfono があります。

2. Frekvenco kaj potenco de elektromagneta ondo

Oni uzas mikroondojn kiel elektromagnetajn ondojn el poŝtelefonoj. Frekvencoj de Mikroondo estas 300MHz ĝis 300 GHz. En Mikroondo oni havas multajn frekvencobendojn por poŝtelefonoj: 700 ĝis 900 MHz, 1.5 ĝis 2 GHz, 2.5 ĝis 4.5 GHz, kaj 28 GHz. En 700 MHz oni antaŭe uzis analogan televidan sistemon. Ankaŭ oni uzas milimetran ondon 28 MHz. Potenco de elektromagneta ondo el ĝeneralaj poŝtelefono: 0.6 ĝis 0.8 W (vato). Ĝia duon-ondolongo (半波長) estas preskaŭ sama kiel larĝo de nia kapo (averaĝe 18 cm), tial nia cerbo povas ricevi ĝian energion efike.



第 70 回関西エスペラント大会 (大阪市立中央会館) の 2 日目、2022 年 6 月 19 日(日) 9:30 からの大会ミニ大学で「携帯電話からの電磁波は危険か?」というタイトルで講演しました。その要約です。 (森川和徳、正会員、大山崎町)

< Kalkulo de Duon-ondolongo >

Kaze de radiata frekvenco de 850 MHz,

$$\text{Ondolongo} = \text{Lumrapideco} / \text{Frekvenco} = \hat{c}. 300\,000\,000 \text{ (m/s)} / 850\,000\,000 \text{ (Hz)} \\ = 0.353 \text{ (m)}$$

$$\text{Duon-ondolongo} = 0.353 / 2 = 0.177 \text{ (m)} = 17.7 \text{ (cm)}$$




3. Bazaj stacioj por poŝtelefonoj

Komuniko inter poŝtelefonoj bezonas bazajn staciojn, kiuj kaŝite troviĝas ĉirkaŭ ni: ekz. en parkumejo, sur la tegmento de konstruaĵoj. Tiuj stacioj ankaŭ radias fortan elektromagnetan ondon. Bazaj stacioj por poŝtelefonoj radias fortan elektromagnetan ondon, maksimume 30 W (vatoj). Laŭleĝe oni devas instali ian barilon por ke ĝeneralaj homoj ne eniru en zonon de alta elektromagneta ondo.




4. Influoj al homa korpo

Poŝtelefono radias elektromagnetan ondon, kiu onidire povas kaŭzi ian malsanon. Oni diras ke elektromagneta ondo povas malbone influi homan korpon en jenaj tri vidpunktoj.

	Ekzemploj	Elektromagneta ondo el poŝtelefono
Ekscita ago	Eksciti homan korpon uzante elektran ondon de malpli ol 100 kHz. 	Ne, ĉar ĝia frekvenco estas tre alta je pli ol 700 MHz
Varmiga ago	Varmigi akvon per Mikroonda forno (2 450 MHz) 	Preskaŭ Ne, ĉar ĝi tute ne povas varmigi homan korpon
Ne-varmiga ago	Kelkaj specialistoj avertas ke elektromagneta ondo povas kaŭzi dormadon, kapdoloron, kaj eĉ kanceron.	Ankoraŭ ne klarigita 

5. SAR (Specifa Absorbo-Ratio)

Oni reguligas elektromagnetan ondon el poŝtelefono per valoro de SAR (Specifa Absorbo-Ratio) en la mondo. SAR estas mezurita de maksimuma ratio, kiom homa korpo absorbas elektromagnetan energion. La japana leĝo reguligas poŝtelefonan radiadon per valoro de SAR, Specifa Absorba Ratio.



La jena tabelo montras limojn de kelkaj nacioj.

	Limo de SAR	Mezura unio
Internacia Normo	2.0 W/kg	10 g
Japanio (ekde 2002)		
Eŭropa Unio		
Usono, Kanado kaj Aŭstralio	1.6 W/kg	1 g
Ĉinio	1.0 W/kg	10 g
Svedio	0.8 W/kg	10 g
Germanio	0.6 W/kg	10 g

Por scii valoron de SAR, serĉu interrete. Se vi havas poŝtelefonon nomatan “Simply”, serĉu interrete per “Simply SAR”. Vi tuj trovas la retpaĝon de SAR pri Simply, kie oni ekscias la valoron de SAR.

SAR (比吸収率) の値を調べる方法は、例えば Simply という携帯電話であれば、「Simply SAR」とインターネットで検索すれば、「Simplyの比吸収率 (SAR)」のページが検索され、そこですぐわかります。

6. Rekomendindaj uzadoj de poŝtelefonoj

Mi rekomendas al ĉiuj jenajn kontraŭrimedojn:

- (1) Elektu tian poŝtelefonon, kies SAR estas malpli ol 1 W/kg.
- (2) Interspacigu poŝtelefonon de via kapo, ekzemple uzante orelumon.
- (3) Parolu per ĝi mallongan tempon.
- (4) Ne uzu vian poŝtelefonon en hospitalo, aviadilo, kaj vagono.

(Fino)

Saluton al ĉiuj

両角 美幸 (もろずみ みゆき、正会員、京都市下京区)

今年度のエスペラント語講座を4月より受講し、その後入会いたしました 両角美幸です。

皆様よろしくお願ひいたします。

エスペラント語につきましては、世界共通言語として作られた人工的な言語というようなことを以前どこかで聞いたことがあるようなという程度の認識でした。

趣味でフルーツカービング講座(タイの伝統文化 フルーツやせっけんをナイフ1本で彫刻するもの)を主催しており、自宅近くの貸し会場を探していた時にエスペラント会館を知り、その時にエスペラント語について興味を少し持ちました。

3年前からのコロナの影響で、フルーツカービング講座は休講しており、今回は4月から何か新しいことを始めたいと思い、インターネットで検索しておりましたらエスペラント会館でエスペラント語講座が開催されることを知り受講させていただくことになりました。

安易な気持ちで参加+能力+語学的センスがないこともあり、毎回 四苦八苦しながらも、楽しく講座に参加させていただいています。

文法などまだまだ分からず、易しいとされている発音さえもたどどしく、習ったことを3秒後には忘れてしまうような状態で、森川先生をはじめ、皆様にご迷惑をおかけしていますが、温かく見守ってもらいながら続けております。

大人になってから、自分だけのために、受験、資格なども関係なく学べることの楽しさを実感しております。

エスペラント語の本を自分で読むことと、いつかエスペラント語で交流できることを目標に、脳活していきたいと考えております。

みなさまよろしくお願ひいたします。



Akvomelona ĉizado
“Fenikso”

Venas la Vintro, Ne Foras do l' Printemp' 冬来たりなば春遠からじ

西田 千津（正会員、京都市右京区）

酷暑の季節に、なんと季節外れな！タイトルかもしれませんが、今、私の気持ちを奮い立たせてくれるのは、この一節です。私達は、昨今のコロナの流行で、人と接触することを避け、家に籠りがちな生活を強いられています。なんだか冬眠しているみたいです。そして、家の中からテレビなどを通じてロシアが起こしたウクライナ戦争を知り、心を痛めています。冬はいつまで続くのでしょうか。しかし、*Venas la Vintro, Ne Foras do l' Printemp'*なのです。これは、イギリスの詩人シェリーの詩に登場する有名な一節ですが、Verda Majo(長谷川テル)も、この一節をタイトルにした一文を著しています。



Venas la Vintro, Ne Foras do l' Printemp'
— dediĉe al kamarado Mangada —

Verda Majo (長谷川テル)
(1912 - 1947)

がタイトルで、冒頭は、

Kial mi japana virino pripensas vin, hispana generalo? Ĉu pro amo? Jes, se tiel diri, pro verda amo.

です。Mangada は、当時、スペイン内戦で人民戦線に加わっていましたが、1939年3月マドリードが陥落してフランコが勝利し、人民戦線派の人々は弾圧を受けます。Verda は、Mangada たち kamaradoj の安否を気遣っています。“verda amo”とは、エスペラントと自分の名前をうまくかけていますね。そして人民戦線の敗因については、ファシストに対する「民主主義」陣営が、「不干涉主義」をとったためだと考えて次のように述べています。

Okcidente, la faŝistoj senĉese projektas provokon kaj intrigon. La “demokratataj” regnoj – kiuj per lupa ĵonglo de “neinterveno” kondukis vin al dumtempa malsukceso — fine deprenis sian maskon. Oriente la japanaj ekzekutistoj daŭre plenumas la senhontan mision.

このころ、Verda は、中国の重慶（国民政府の臨時首都）にいて、結核で、病床に伏

していました。重慶は、日本軍が攻めにくい山奥に位置する都市ですが、その気候は、Verda の健康にはよくなかったようです。Verda は次のように言っています。

Kaj, decembro de ĉi monta ĉefurbo estas nebula, malserena. Jam pli ol semajnon sunradioj ne vizitas mian malsanliton.

しかし、Verda はこう続けます。

Sed eĉ peceton da malgajo aŭ malespero mi ne sentas. Kontraŭe, ardiĝo de nova batalemo skuas mian febretran korpon. Kun plena ĝojo kaj fiero mi deklaras, ke la ĉina popolo neniam sklaviĝos antaŭ perforto kaj ĉinaj esperantistoj neniel perfidos la brilan stelon sur la brusto.

日本で暴力や不正義、差別などの社会矛盾に悩んでいた Verda は、中国人のエスペランティストと結婚し、中国に渡って、中国人エスペランティストと共に、抗日・反戦のために力を尽くしました。彼女は元々前向きな性格だったようですが、日本軍に攻撃され、悲惨な戦争被害にあっても諦めない中国の人たちの抵抗の姿勢に勇気をもらっていたようです。悲しいことや辛い事が多いと、この不幸は永遠に続くのではないかという錯覚に陥りがちですが、辛い冬こそ、来るべき春を信じて、「不干渉主義」に陥らず、仲間と共に力をつける時期なのでしょう。

最後になりましたが、私は Verda Majo の研究をしており、4月から京都エスペラント会に入れていただきました。エスペラントは3月から始めた初心者で、今までは日本語訳や中国語訳に頼って作品を読んでいましたが、エスペラントの原文がわかるようになったら、翻訳では表しきれない原文の味わいを感じることができるようになりました。みなさん、どうかよろしく願いいたします。

(終)

西田さんは、第70回関西エスペラント大会(大阪市立中央会館)の2日目、2022年6月19日(日)13:00からの公開講演「長谷川テルをとおして平和を考える」で講演されました。

(編集子)

Floroj kaj malnova vendejo

Joŝii Ŝigeko (Nagahama)

Florvendejo malfermiĝas nur unu tagon en ĉiu jaro. La tago estas plena de printempaj floroj. Ĉiuj serĉas printempajn plantidojn kun rideto. Estas mirinda, ĉu ne? Kiu vendas florojn? Tiu estas mi! Ĉi tio estas unu aŭtuna tago, kiu daŭras dum la 15 jaroj.

Mia bofratino administras malnovan vendejon en la vilaĝo. La vendejo vendas ĉion, kion la vilaĝanoj bezonas. Ĝis la epoko de Showa, ĉi tiu vendejo estis nemalhavebla ekzisto en la areo, la vendejo prosperis. Malgraŭ tio ŝanĝiĝis kvazaŭ kandellumo en vento.

Pro la tempo-fluo, tro multe da grandaj komercocentroj aperis ĉi tie en Nagahama. Krome, ŝia edzo subite mortis. En tiu tempo, mi sentis, ke ŝi estas kiel la ĉefrolulino de malĝoja rakonto. Malgraŭ tio, ŝi estis kuraĝigita por la aspiroj de proksimecaj maljunuloj, kiuj ne facile povis iri al grandaj komercocentroj, alivorte, aĉetaj rifuĝintoj. Ŝi eklaboris. Ĝi komenciĝis frumatene ĉiutage sen paŭzo.

Ŝia vendejo estas malproksime de mia domo. Sed fojfoje mi iris por aĉeti manĝaĵojn kaj uzaĵojn.

Floroj de la kvarsezonoj komisiitaj fare de la proksima agrikultura mezlernejo, nun estas vicigitaj en ŝia malnova vendejo. Kiam mi aĉetis tion, kion mi bezonis, ankaŭ mi ĉiam aĉetis la florplantidojn. Sed kiam mi fikse rigardis, florvendado ŝajnis esti malalta.

Io ŝprucis en mian kapon en tiu momento. Jes!, mi havas multajn amikojn kaj najbarojn, kiuj amas florojn. Mi imagis, ke ĉiuj ĝojas fari belajn florojn. Mi zorgos pri ĉi tiuj floroj ĉe mia domo, kaj se mi vendos ilin, ĉiuj estos feliĉaj. Ĉi tio estas la ununura afero, kiun mi povas fari por feliĉigi kaj vigligi mian bofratinon. Mi diris al mi en la koro, ke mi tion nepre elfaru.

La tago finfine venis. Multaj printempaj floroj alportitaj de mia bofratino floras en mia ĝardeno. Mi telefonis al floramantoj, “Estas multaj floroj preparitaj por morgaŭ, do bonvolu veni por vidi ilin.”

La sekvan tagon, multaj homoj venis de frua mateno. Ĉiuj venis rideti kun siaj amikoj kaj siaj infanoj. Mi klarigas, “Estas pli malmultekostaj ol tiuj sur la merkato,

kaj ili estas fortaj. Ĉar ili estis faritaj de bonaj lernantoj.” Ĉiuj kapjesas, iliaj okuloj brilas.

Mi estis certe mirigita, kiam 33 kestoj (792 potoj) estis elvenditaj. Miaj amikoj kaj najbaroj diris “Dankon pro via zorgado”. Kaj mia bofratino diris, “Mi eĉ ne serĉas en la tuta Japanio homojn kiel vi, kiuj multe vendas.” Krome, ŝi ricevis dankvortojn de la agrikultura mezlernejo “Dankon pro viaj grandaj kunlaboroj.” Ĉiuj nur ridetis!

Ĉi tio estas la 3-direktaj bonaj de Oomi-Komercistoj, ĉu ne? Kia mirinda afero!

Ankaŭ hodiaŭ venas maljunuloj, eksterlandanoj (vjetnamano, brazilano, boliviano) kaj junaj lernantoj en ŝia vendejo. Ĉiuj scias, ke ĉi tiu vendejo daŭras, ne nur ĉar la produktoj estas malmultekostaj, sed ankaŭ ĉar ŝi estas vigla kaj amika.

(Fino)



エスペラント語の絵本

西本 祐子（正会員、大阪市）

エスペラント語に出会ったのは 野田淳子さんのコンサートで初めて知りました。流れるような発音の音色に聞き惚れて こんな言葉があるんだと感動しました。そこから歌ってみたいと。

レッスンは平日の昼間や土曜日の昼間しかなく、なかなか参加できなかったのですが、たまたまコロナでフレックスタイムの時に土曜日のレッスンに参加できて、その後も森川様のご厚意によって夜の時間もしてもらえるようになり、支えてくださる方も一緒に入ってください、とついてもついています。


エスペラント語の造られた経緯を知ることにより、学ぶことと共に広めていかないとって思いました。

そんな折、去年に絵本『つつまれて』を出版して 心がつらくなっている方に何もないと思っていても本当は自然に包まれていること 愛されて生まれてきたことを知って貰いたいと そして、エスペラント語の絵本も出版しました。

多くの方に手に取ってもらいたい。

宇宙から見れば地球は一つ 奪い合うことなく シェアして幸せな世界を共に作っていきたいです。

絵本のお問合せ先 パワーアーティスト協会 youyucompany@gmail.com



八木幹子さんの思い出

相川 節子（準会員、宇治市）

八木幹子(やぎ みきこ)さんが亡くなっていたことがわかった。(2021年9月逝去、享年70歳)

50年ぐらい前からずっと京都エスペラント会の会員で、1980年前後に活躍された。例会の常連出席者だっただけでなく、会計として会の財産をきちんと管理し、また入門講習の講師も何度か勤めてくださった。関西大会や合宿にもよく参加されていた。

それらの活動の中で、八木さんにしかできないユニークな活動があった。八木さんは編み物が得意で、編み機を使いこなしていた。その特技を生かし、緑の星や“ESPERANTO”の文字を編み込んだセーターやベストを作った。京都で関西大会が行われたとき（不確かな記憶だが、1976年の第24回大会）組織委員会（今の用語では実行委員会）のメンバーは全員彼女が編んだベストを着用した。

1981年の関西大会だったと思うが、Gaja Vespero で京都エスペラント会は出し物として「ファッションショー」を行った。何人かの会員が出演、ひとりずつ舞台を歩く。それぞれ、エスペラントをあしらったニット製品を身につけている。端まで進んでくると向きを変えるところは、本物のモデルのようで、みなさんかっこよかった。当時活発な会員だった加柴浩二さんが“Mi estas Koji”という文字を編み込んだセーターを着て登場されたのを覚えている。こんな細かい文字を、刺繍ならともかく編み物で表現するのは、八木さんの腕前が相当優れていたからだと思う。

このショーでの八木さんは、デザイナーであり技術者であり、同時にモデルでもあった。わたしの知る限り、エスペラントの大会でファッションショーが行われたのは、この時一回だけだった。

また八木さんは、当時勤めておられた会社の技術を利用して、緑の星やエスペラントの文字を印刷したシールとかビニールの手提げ袋とかを作って、実費で売ってくださった。こういうものは今なら簡単に業者に注文できるが、当時は珍しかった。

わたしは個人的にも、八木さんに恩を受けている。

1970年前後、ミニスカートが流行った。その後ブームが下火になったとき、八木さんは着なくなったミニスカートをたくさん、わたしにくださった。当時うちの娘たちは小学生。スマートでウエストが細い八木さんのスカートが、小学生にぴったりだったのだ。シングルマザーだったわたしは、経済的にも助かったし、センスのよい八木さんのスカートは、見るだけでも楽しかった。

八木幹子さん、いろいろありがとうございました。

(終)

Nun necesas la naŭa artikolo de la japana konstitucio

Aikawa Setuko

2022年5月4日、「憲法記念日」の翌日。京都新聞朝刊第一面の見出しは「改憲論、ロシア侵攻で勢い」でした。それを見て不安になって、投書欄へ投稿しましたが不採用。多くの投稿が集まるのだから、ボツになったこと自体に文句はありませんが、せっかくなのでエスペラントに翻訳してここで披露します。

En la 4-a de majo la unua artikolo de la ĵurnalo ‘Kyoto-Shinbun’ havis titolon ‘Opinio revizii la konstitucion nun plilaŭtiĝas pro invado far Rusio’.

Mi mem opinias tute male vidante la nunan situacion de Ukrainio. ‘Rezisti per armiloj, se okazos invado’ estas la plej danĝera maniero.

Se milito komenciĝas, ĝi ne finiĝas ĝis la tempo, kiam unu el la militantaroj ne plu povas elteni. Malvenkas la flanko, kiu ne plu povas lasi damaĝon de sia popolo. Esti venkinto ne signifas esti justa aŭ esti maljusta.

Por ne doni al Rusio aŭ al Korea Demokrata Popola Respubliko pretekston por invado, necesas la naŭa artikolo ja nun. La Defenda Korpuso ne estu armeo por mortigi homojn, sed jam estu organizo nur por savi damaĝitojn de katastrofoj.

Se ne okazus la milito, la rusaj soldatoj kaj la ukrainaj soldatoj ne estus mortigistoj, sed estus bonaj patroj en la hejmo kaj pacaj civitanoj en la urbo aŭ vilaĝo. Mi ne deziras, ke la soldatoj de Japana Memdefenda Korpuso estu mortigantoj. Mi ne deziras ankaŭ, ke ili estu mortigitaj en milito.

Danke ricevitaĵoj

京都エスペラント会には、他団体の機関誌が定期的に届いています。エスペラント会館で保管していますので、関心のある方は見に来てください。(E=エスペラント)

La Revuo Orienta (日本 E 協会)

Ondeta Ŝiga (近江 E 会)

La Japana Budhano

La Voĉo (大阪 E 会)

(日本仏教エスペランティスト連盟)

SENLIMO (神戸 E 会)

La Tamtamo, Novaĵoj Tamtamas

Fontejo (堺 E 会)

(NPO 法人 E よこはま)

La Vento (吹田 E 会)

Heroldo de HEL (北海道 E 連盟)

La Zelkovo (高槻 E 会)

Vento de Ihatov (イーハトヴ E 会)

La Lampiro (豊中 E 会)

La Apro (池田 E 会)

Verda Placo (はりま E 会)

Verda Teo (宇治城陽 E 会)

Cent Ŝtupoj de Ŝtuparo

Macumura Ŝiniĉiroo (Kioto)

La nova kronviruso-epidemio dum la lastaj du jaroj influis miajn ĉiutagajn vivojn. Ni devas eviti amason da homoj, do mi detenis sin eliri. Pro tio mia korpa forto malfortiĝis. Mi anhelas kiam mi supreniras ŝtuparon ĉe stacio, kaj mi sentis min malforta en miaj genuoj kiam mi malsupreniras ĝin. Mi pensis kion mi faros? “Bone!” Mi rememoris artikolon de Ŝoonen Magaĝin, kiun mi legis kiam mi estis infano. En ĉi tiu artikolo Hoŝi Ittecu, kiu estas la patro de Hoŝi Hjuuma, respondis al demandoj de knaboj. En unu el ili knabo demandis pri metodo fortigi korpan forton. Ittecu respondis: “Faru cent genuajn fleksadajn ekzercojn ĉiutage dum monato. Tiam vi certe povos fariĝi sportisto.” Mi decidis ke mi komencas genuan fleksadan ekzercon. “Unua, dua, tria • • naŭa. Ne! Ne! Mi ne povis.” Mi rezignis ĝin.

Denove mi pensis kion mi faros? “Bone! Ŝtuparo!” Tio, kion mi devas fari, estas supreniri cent ŝtupojn. Mia domo havas ŝtuparon de dek kvar ŝtupoj. Se mi supreniros la ŝtuparon de mia domo ok fojojn ĉiutage, mia celo estos atinginta. “Atendu unu sekundon. Se mi farus tion, kion pensus mia edzino kaj filo?” Ili verŝajne pensos ke mi estas stranga. “Ne ĝenu.” Mi supreniris la ŝtuparon ok fojojn kaj mi faris tion. “Tio estas ridinda faro.” Mi rezignis supreniri la ŝtuparon de mia domo. Mi demandis min: “Kie estas la cent ŝtupoj?” “Templo! Estas Biŝamon (毘沙門)” Mi rememoris ke Biŝamon havas longan ŝtuparon. Sekvantan matenon mi iris al Biŝamon. Estis longa ŝtuparo. Mi tuj komencis grimpi kiel montogrimpisto. Unua ŝtupo, dua ŝtupo, ĉe kvara ŝtupo mi komencis anheli. Ĉe sepa ŝtupo ŝvito gutis. Mi penis kaj penis kiel la Reĝo Pimento. Sesdek kvara, sesdek sesa, sesdek sepa. “Ho ne! Estas nur sesdek sep ŝtupoj.” Mi sidiĝis sur la supro de la ŝtuparo. Mi sentis venton kiam mi trinkis akvon. “Tre bone.” Mi komprenis ke ĉi tia situacio estas tre bona. (Fino)



京都での例会





エスペラント会館での会合

名称	日時		内容
エスペラントおしゃべり会	毎週月曜日	午後 6 時 30 分 ～8 時 30 分	・ 田平正子さんが主催 ・ 参加費 1 回 300 円
水曜例会 (注)	毎週水曜日	午後 2～4 時	・ 輪読 “対訳狂言 Noaj Komedioj” ・ La Movado 等発送作業など
土曜例会・初級	月 2 回 土曜日	午前 10～12 時	・ トピック ・ 輪読 “Hanako lernas Esperanton”
土曜例会・中級		午後 1～3 時	・ トピック ・ 輪読 『エスペラント中級独習』 ・ やさしい作文

注) 水曜例会はスカイプを併用。参加者の半数はスカイプで参加しています。

ウェブ講座 ※全員スカイプ利用

名称	日時		内容
月曜講座 1	月 2 回 月曜日	午後 7 時 30 分 ～8 時 30 分	・ トピック ・ 輪読 “Vojaĝo de Onia, JAPANA” ・ 歌
月曜講座 2	毎週月曜日	午後 8 時 30 分 ～9 時 30 分	・ 輪読 “Verkoj de Verda Majo”



La malnova KLEG-oficejo




Lastatempe mi devis iom ordigi mian ĉambron kaj hazarde trovis ligno-gravuraĵon de la malnova KLEG-oficejo. Unu-rigarde mi sciis, ke ĝi estas farita de fame konata TAKEHANA To (竹花 人), ĉar mi posedas kelkajn aliajn de lia gravuraĵo. Antaŭ la japanstila domo sidas kelkaj homoj tenantaj KLEG-standardon. Ili devas esti tiamaj aktivuloj. Mi eĉ povas diveni unu aŭ du personojn inter ili. Sur la fasado troviĝas signo-tabulo de KLEG kaj en la japana kaj en esperanto, kaj sur la muro pendas verda stelo. Mi memoras, kiam mi vizitis tiun oficejon por la unua fojo. La domo estis malnova ol la domo en la gravuraĵo kaj la tegmento iom klinita. Malantaŭ la malluma oficejo, aperis s-ro Miyamoto Masao, kun okulvitroj kaj amikema rideto. Tiam mi ĵus eklernis esperanton, kaj preskaŭ nenion sciis pri la libroj, krom lia nomo. Bedaŭrinde mi tute ne memoras kion diris s-ro Miyamoto. Iom poste la oficejo translokiĝis al la nuna loko en Sone. Pere de Fejsbuko mi konigis la gravuraĵon kaj kelkaj enskribis komentojn pri taŭga maniero konservi ĝin. Mi dubas, ĉu eble aliaj ankaŭ posedus la samon.

(Macuda joko, Kioto)

FM79.7 京都三条ラジオカフェ「エスペラントって何？」

毎月第2・第4水曜日、13:04~13:10に放送しています。
生放送が聴けない方は、ウェブページ「ラジオカフェ エ
スペラント」で検索して、お聴きください。



⇒ <http://radiocafe.jp/201603001>

この放送を続けるための資金は、京都エスペラント会とは別会計にしています。

皆様のご支援をお願いいたします。

支援カンパの送付先：ゆうちょ銀行・振替口座 00990-3-23971 「野田淳子」



第143回：2022年2月23日
「わたしと日本舞踊」
(相川節子さん、成田和子さん)



第147回：2022年4月27日
「エスペラントで聴く、その2
ウクライナを思う世界の声」
(富田成美さん)

Al Vi Kara N-ro 107, eldonita en aŭgusto, 2022

京都エスペラント会 Kioto-Esperanto-Societo

◎事務局

〒600-8455 京都市下京区西洞院五条上る八幡町 537-6 エスペラント会館

電話 : 075-343-3120

ブログ : <http://esperanto.jp/kyoto/>

電子メール : esperanto_kioto@yahoo.co.jp

会費 : 正会員 年 7,200 円

準会員 年 3,600 円 (準会員の条件は La Movado 購読)

ゆうちょ銀行・振替口座 : 01000-4-9895 「京都エスペラント会」

◎Al Vi Kara 編集局

連絡先 : 〒618-0071 京都府乙訓郡大山崎町大山崎尻江 13-8 森川和徳

電子メール : kz_morikawa@yahoo.co.jp

PDF ファイルの保管アドレス <http://goo.gl/FgFEb>